BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

PROPRA SIDEJO:

Ed. Jockey Club, sala 103
70.300 - Brasília - DF
Tel.: (061) 226-1298
Caixa Postal 07-1182

CGC Nº
00406 604/0001-06

1887-1987
Centjara jubileo de Esperanto

MAJ.–JUN. / 1985 INFORMA BULTENO N-ro 88

# PLIA LINGVO EN UNESKON?

En *Un kaj ni,* ń-ro 35, estas raportite, ke la Plenuma Komitato de Unesko traktis la temon pri eventuala enkonduko de la portugala lingvo.

Post peto, la redaktantino ricevis pliajn rilatajn dokumentojn per nia estraranino pri eksteraj rilatoj B. Despine (Despiney).

En 1982-07-26 – 08-16, en Meksikurbo okazis Monda Konferenco Pri Kulturaj Politikoj, organizita de Unesko. Ĝia "Rekomendo n-ro 73" temas pri portugala kaj aliaj lingvoj. Ĝi rekomendas la ĝeneralan direktoron de Unesko antaŭenigi la studojn pri la ebleco enkonduki la portugallingvon kiel laborlingvon de Unesko kaj konsideri la meriton de la portugala kaj aliaj lingvoj por vasta uzo kiel laborlingvoj en kunvenoj aŭspiciataj de Unesko.

La motivo de tiu rekomendo estas: (1) ke la portugallingvo nuntempe estas la oficiala lingvo de Portugallando, Brazilo, Verdakado, Gine-Bisao, Sankta-Tomeo,kaj-Princo, Angolo kaj Mozambiko; (2) ke la portugallingvo estas uzata ankaŭ en diversaj landoj, enkluzantaj landojn en Azio kaj la Pacifiko, ĉu en vulgara formo ĉu en regionaj variaĵoj; (3) literaturaj verkaĵoj kun internacia signifo estas verkitaj dum jarcentoj portugale; (4) ke pro tiuj kialoj la portugallingvo kaj literaturaj verkaĵoj en ĝi estigas kulturan heredaĵon, kiu bezonas esti pli plene kaj vaste konata kaj studata kiel signifa parto de la kultura heredaĵo de la homaro; (5) ke la portugallingvo estas oficiala en la Organizo De Amerikaj Ŝtatoj kaj estas plie uzata kiel laborlingvo en aliaj internaciaj organizoj kaj en diversaj regionaj kunsidoj; (6) ke la portugallingvo nuntempe servas kiel perilo de esprimo por pluraj popoloj posedantaj diversajn kulturajn identecojn.

(Unesko-dokumento:
120 EX/29 Corr, 1984-08-31.)

# KLARIGO

Jam enskribiĝis ĉ. 400 por 1a 21a Brazila Kongreso, de la 17a ĝis la 21a de julio, en Belo Horizonte - MG. Oni preparos belan eventon kun plej varia programo. Venu festi kaj diskuti movadajn aferojn. Loka Organiza Komitato: R. Carijós, 141 salas 807/808 — 30000 B. Horizonte - MG.

## ĜI NE TAŬGAS!

*Moderna kaj pensiga vera historio*

*Alberto Flores*

Juna laboristo eniris en vendejon de elektronikaj aparatoj.

Li volis aĉeti radion.

La vendisto konvinkis lin aĉeti belan ricevilon, kapabla kapti elsendojn en mallongaj ondoj.

— "Tiu ĉi aparato estas vera miraklo de la moderna eletroniko", diris la vendisto, "Per ĝi vi povos aŭdi radiajn elsendojn el la tuta mondo!"

La junulo aĉetis la multekostan aparaton kaj iris hejmen tre feliĉa.

Sed, dome, kiam li unuafoje provis aŭdi la internaciajn elsendojn en mallongaj ondoj, li tuj seniluziiĝis!

Li nur aŭdis voĉojn kiujn li tute ne komprenis!

Li ŝanĝis kaj reŝanĝis la staciojn, sed la afero restis ĉiam la sama: Li ne sukcesis kompreni la vortojn de la eksterlandaj parolistoj!

En la sekvanta mateno, frue, la malfeliĉa aĉetinto kunportis la ricevilon al la vendisto:

— "Ĝi ne taŭgas", li diris, "Tiuj uloj de la radio parolas kaj parolas sed diras nenion komprenebla! Ili ne scias paroli kiel mi!".

Kaj li preferis aĉeti pli simplan radion, kiu kaptis nur la naciajn elsendojn, sed en la klara kaj komprenebla patrina lingvo!

## EK AL B.H. !

La antaŭa n-ro 87 entenis 2 eldonojn — jan/feb, kaj mar/apr., pro la estrarŝanĝo kaj tial ke la bultenon eldonis la antaŭa prezidanto en San-Paŭlo, kaj nun ni redaktas kaj presigas ĝis en Braziljo. Sed ekde nun ni aperigos ĝin regule ĉiun duan monaton, kvankam pro la ĉiam pli alta kosto ni nepre bezonas multajn aliĝkotizojn kaj bonvolajn donacojn.

**BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO**

**Honoraj Prezidantoj**

**Francisco de Souza Almada (Av. Bern. de Campos, 624 Ap. 72, BR 11100 - Santos-SP)**
**Carlos A. S. da Cunha (Alameda dos Maruás 471, BR 04068 - S. Paulo-SP)**

**Estraro (1985/87)**

**Prezidanto - Nelson Pereira de Souza**
**Tel.: 242-5211 (061)**
**Vicprezidanto - Elvira Fontes (Caixa Postal 5.888, CEP 01000 - S. Paulo-SP)**
**Sekretario - Ludimar Azevedo da Silva**
**Tel.: 562-8904 (061)**
**Kasisto - José Carlos Dorini Ramos**
**Tel.: 577-2214 (061)**
**Kulturaj Aferoj - Dro Paulo Vieira da Silva**
**Tel.: 553-1365 (061)**

**Informa Bulteno**

**Ricevas ĝin senpage la Membroj kaj ĉiu, kiu faras donacon almenaŭ unufoje en la jaro.**

**Ĉefredaktoro**

**Nelson P. de Souza**

**Kunlaboraĵoj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.**



## TRA LA MONDO

• ŜIRAZA ESPERO (P. O. Box 749 – Shiraz 71365 – IRANO) – monata revuo kun tre interesaj artikoloj kaj ankaŭ bildhistorio "La Aventuroj de SUPERZAM – Moderna heroo".




• VENEZUELA STELO – organo de Venezuela E–Asocio (Apartado 47675 – Caracas 1041/A – VENEZUELO). Riĉa enhavo, inkluzive de "Junulaj Paĝoj".
• AMIGOS DE LOPEZ LUNA (C. Correo 2507 – 1000 Buenos Aires – ARGENTINO). Koran dankon pro la donacaĵeto: "Voĉeto en la Dezerto".
• SCIENCISTA KAJ TEKNIKA E–ASOCIO (Fuxingmenwei Sanlihe – Beijing – ĈINIO) proponas interŝanĝi informojn kaj spertojn pri ĉiuj fakoj cele al renkontiĝo dum la 71a. UK en 1986.
• HUNGARA FERVOJISTA MONDO (Pf. 7 – H–1378 – Budapest – HUNGARIO). Oficiala organo de la fortega fervojista movado, bele presita, enhavoriĉa.
• KULTURA CENTRO ESPERANTISTA (Pf. 771 – CH–2301 La Chaux-de-Fonds – SVISIO) proponas kursojn, feriojn, staĝojn k.a. eĉ al tiuj, kiuj pagus sian restadon per manlaboro.
• LAŬZANA E–SOCIETO (Place Chauderon 5 – CH–1003 Lausanne – SVISIO) okazigis en Majo tre allogan programon: semajnfinojn de sensitivekzercoj.
• INTERNACIA E–KURSEJO (P. K. 791 – 1090 Sofio – BULGARIO) okazigos en la venonta 11a/16a. Septembro Internacian Simpozion kun temo: La lingvaj obstakloj al la libera evoluo de turismo. Ni penu interesigi niajn turismajn instancojn pri ĝi. Kiu pretas ĝin reprezenti en Brazilo?
• KVAKERA ESPERANTISTO (54 Selborne Rd. – Southgate – London NI4 7DH – BRITIO) aperas kvarmonate kun interesa religia enhavo.
• JUNA ĈILIO (Casilla 13828 – Santiago 21 – ĈILIO) – dulingva bulteno montranta, ke tie oni aktivas.
• OOMOTO (Kameoka-ŝi – Kioto-hu – 621 JAPANIO), unu el la plej belaj E–revuoj kun plej interesaj artikoloj.
• INFO–SERVO (Bismarckstr. 28 – D–3550 Marburg – F.R. GERMANIO) eldonas Tutmondan Esp-istan Adresaron. Ni pretas sendi kopion de la enketilo kaj subskripciilon al la brazilaj interesatoj.
• VEL.º – bulteno de Vojvodia E–Ligo (Trg. cara Jovana Nenada 3 – 24000 Subotica – JUGOSLAVIO), krom tre interesaj legaĵoj aperigis artikolon de s-ano Modesto B. Abreu (P. Alegre–RS) Pri "la plej aĝa brazilano". Temas pri murpentraĵo trovita de franca arkeologo Jean Periê proksime de la urbo Rondonopolo, en ŝtato Matogroso.
• UN kaj Ni (Frankrijklei 140 – B–2000 Antverpeno – BELGIO). La n-ro 37 raportas pri la enkonduko de portugallingvo en Uneskon. Ni aparte transskribas parton.
• MONDA TURISMO – ESPERANTOTUR – Unu el la plej bonaj nuntempaj servoj en la Movado. Jam eblas per favoraj prezoj vojaĝi tra la tuta mondo, dum la tuta jaro, per Esperanto. Reprezentanto en Brazilo: Giuseppe Grattapaglia – C.P. 04–0097 – 70000 Brasília-DF.



## NIA FAMILIO "KRESKEGAS"

Ni bonvenigas niajn novajn membrojn:

KATEGORIO "A"
Belorizonta E–Asocio - MG
Societo Esperanta de Salvador-BA

KATEGORIO "C"
Altino Araujo Vasconcellos - DF
Josias Ferreira Barboza - DF
Paulo Cesar Lage Barbosa - DF
Moacir de Melo - MG
Ana Maria R. S. Lage Barbosa - DF
Dirceu Francisco - SP
A. A. Antunes Jr. - SP
David Bianchini - SP
Olivia Vieira Soares - RJ
Waldimiro de Souza - DF
Carlos Augusto Guedes - MG
Sergio Eglin Batista - PR
Manoel Moacir Siscati - SP
Solange Oliva Brasil - MG
Hilmar Ilton S. Ferreira - BA
Agnaldo Costa Pereira - BA
Inácio Bezerra de Araujo - BA
João Barros de Santana - BA
Marta Mirambel Ribeiro - SP
Antonio Egéa Marim - SP
Genildo Martins Coelho - SP
Nilson Ruiz Sanchez - DF
Jorge Matias Pereira - RJ
Germana Géusa B. Vasconcelos - RJ
Affonso B. G. Soares - RJ
Alfredo Aragón - RJ
Manoel Fernandes Silva Sob. - RJ
Romualdo de Castro Celani - RJ
Walter F. C. Muricy - RJ
Venina Netto - RJ
Suely Mavione S. Silva - MG
Vanilda Sabino - MG
Maria Lourdes A. Araujo - MG
Wilson Aparecido Reis - MG
Hilda Santa Cruz - MG
Yara Lopes Galvão - MG
Antonio G. G. Senna - MG
Jefferson Monteiro - MG
Milene Ferreira Menezes - BA
Zaida Straede - DF
Ely Figueira - RJ
Marcelo F. C. Rocha - BA
Bernstein de Oliveira - SP

## SALUTO DE BKE AL LA BEJO–KONGRESO

ESTIMATAJ!

KUN GRANDA PLEZURO B. K. E. SALUTAS LA SEPAN KONGRESON DE BEJO, DEZIRANTE AL VI ĈIUJ – ORGANIZANTOJ KAJ PARTOPRENANTOJ – LA PLEJ BRILAN SUKCESON.

NIN REPREZENTAS KAJ FARAS ĈI TIUN SALUTON NIA DIREKTORO POR JUNULARAJ AFEROJ – FLÁVIO FONSECA; KAJ NI ESPERAS, KE VI RIGARDOS ĈI TIUN FAKTON KIEL PRUVON PRI NIAJ PLEJ AMIKAJ RILATOJ KUN LA GEJUNULOJ'

VERE, KIAM PROKSIMIĜAS LA CENTJARO DE ESPERANTO KAJ LA TRANSIRO AL LA JAROJ 2000, ĈIUJ DEVAS KONVINKIĜI, KE LA PLEJ GRANDA FORTO EN NIA NOVADO ESTAS EKSTERDUBE LA JUNULARO. TIAL B.K.E. KONSCIAS PRI LA POTENCIALO DE LA JUNULFORTO KAJ NI PRETAS ĈIAM KUNLABORI KUN VI, KIUJ EN LA NUNA MOMENTO JAM MONTRAS KIAN BELAN ESTONTON NI POVAS ATENDI.

LA ESTRARO




## MONDONACOJ ESTAS BONVENAJ!

| | |
|---|---|
| José B. Campos - CE | 10.000 |
| Nelson Ribeiro - SP | 110.000 |
| Ivon Barbosa - SP | 10.000 |
| Vivaldo M. Silva - RJ | 20.000 |
| Solange O Brasil - MG | 5.000 |
| Wilson Veado - MG | 10.000 |
| Affonso B. G. Soares - RJ | 90.000 |
| Soc. Bauruense de E. - SP | 15.000 |
| Soc. E-a Salvador - BA | 10.000 |
| Bernstein Oliveira - SP | 5.000 |
| Nelson P. Souza - DF | 125.640 |
| Mauro L. Fonseca - RJ | 10.000 |
| Claudio Zimmermann - SP | 20.000 |
| Elio L. Oliveira - MG | 5.000 |
| Luis A. P. Menechino - SP | 5.000 |
| Geraldo J. S. andrade - MG | 10.000 |
| Mozar A. Andrade - MG | 5.000 |
| Nelson Bernardo - SP | 10.000 |



# BRAZILAJ NOVAĴOJ

## BAHIO (BA)

• O CORREIO (C.P. 292 – 45660 Ilhéus-BA) aperigas informojn pri E. dank' al la imitinda batalado de s-ano Eléus L. Sã.

• BAHIA ESPÍRITA – organo de Federação Espírita do Est. Bahia (Cruzeiro de S. Francisco, 8 – Terreiro – 40.000 Salvador-BA) regule diskonigas novaĵojn pri E.

## FEDERACIA DISTRIKTO (DF)

• EAB – E–ASOCIO DE BRASILIA (C.P. 11–1124 – 70.000 Brasília-DF) disdonis raporton pri la gramatika kaj pedagogia kursoj, kiujn ĝi okazigis. Ni ĝin rekomendas kiel nepre legindan. Petu kopion.

• UNUA RENKONTIĜO ESPERANTISTA DE BRAZILJO – o kazos la 17an de aŭgusto ĉe: Centro Educacional Nº 2 do Gama – Área Especial – Setor Oeste, organizita de EAB.

• KULTURA SEMAJNO – de 1a 22a/28a julio. Ĝin organizas EAB kaj estos 2 partoj: a) La Arto Traduki, ĝin gvidas Leopoldo Knoedt; b) Rondo de Prelegoj: Carlos L. Melo, Roberto P. Nogueira, Valdemir Moreira kaj Nelson P. Souza.

## GOJASO (GO)

• INSTITUTO GOIANO DE E: (Av. Goiás, 636 s/104 – Ed. Bco. Merc. Brasil – 74000 Goiânia-GO) elektis novan Estraron: Prez. Eber Vaz; Vic. Fabrício R. Valle; la Sekr. Itamar B. Souza; 2a Sekr. José F. Souza; la Kas. Siloé E. Fernandes; 2a Kas. Igor T. Matta; Bibl. Osmira F. Silva; kaj Kontrolan Komitaton: Raul Conde, Frederico P. Cedro kaj Antonio L. B. Pereira.

## MARANJO (MA)

• AEMA – Ass. Esp. do Maranhão havas novan adreson: Av. Mal. Castelo Branco, 605 s/225 – S. Francisco – 65000 São Luís-MA). Laŭ sciigoj de ties Sekretario Gilson Villas Boas (antaŭe loĝinta en Vitória-ES) la tiea Movado kreskas.

## MINAS ĜERAJSO (MG)

• DEPARTAMENTO ZAMENHOF – la E-fako de União Espírita Mineira (R. Guaranis, 315 – 30.000 B. Horizonte-MG) aktivas per regulaj bazaj kursoj, grupa lernado por progresantoj, kaj eĉ inaŭguras E-grupojn en najbaraj urboj, ekz. Pedro Leopoldo.

• LIVRARIA ESPÍRITA EMMANUEL (Av. Contorno, 1286 – 30.000 B. Horizonte-MG) krom aliaj esp-aĵoj havas kelkajn ekzemplerojn de PIV – po 57 dolaroj. Vizitu ĝin dum la 21a.

## PARAO (PA)

• KEZ – KLUBO ESP-ISTA ZAMENHOF (C.P. 2012 – S. Braz – 66.000 Belém-PA) plu eldonas La Verdan Papagon kaj havas novan Estraron: Prez. Alberto Milhomens; Vic. Jorge Elarrat; la Sekr. Ramiro Castro; 2a Sekr. Fernando Beltrão; la Kas. Antonio Bastos; 2a Kas. Augusto Praxedes.

• Dum spiritisma libro-vendado troviĝis E-verkoj laŭ iniciato de Grupo Fraterno Jésus Gonçalves.

## PARANAO (PR)

• Paraná E-Asocio (Rua Dr. Murici, 542 s/1201-2 – 80000 Curitiba-PR) viglas precipe pere de la oficiala bulteno "Paraná Informilo".

## PERNAMBUKO (PE)

• PERNAMBUCO ESPERANTISTA (C.P. 1139 – 50000 Recife-PE) regule aperas, kiel organo de Associação Pernambucana de E., kiu faras kampanjon por propra sidejo. Ĉiuj devas helpi!

## RIO–DE–ĴANEJRO (RJ)

• CLUBE DE E. DE CAMPOS (Rua Tte. Cel. Cardoso, 821 – aŭ C. Postal 182 – 28100 Campos-RJ) elektis novan Estraron: Prez. Joel M. Soares; Sekr. Jayme A. Patrício; Kas. Manoel G. S. Pereira; Dir. Instr. Marta F. Mendonça; Dir. Prop. Edmar S. Rangel; Soc. Dir. Elizabete Carvalho; kaj Kontrolan Komitaton: Vivaldo M. Silva, Rossini V. Nunes kaj Katia de Paula.

• BRAZILA E–LIGO (Praça da República, 54/2º – 20211 R. Janeiro-RJ) brile aktivas pere de "BEL–Informas", "E–Notícias", kursoj kaj aliaj servoj al la brazila esperantistaro.

• VERIDIANO ARAUJO (Rua Gomes de Matos, 78 – 28970 Araruama-RJ), kvamkam

tre maljuna, daŭras sola la pupteatran laboron, kiun iniciatis em Pernambuko lia forpasinta edzino CARMOSINA. Kiu povas helpi lin?

• E–GRUPO I. G. BRAGA (Rua Silva Cardoso, 673 – Bangu – 21810 R. Janeiro-RJ) daŭre organizas kursojn kaj okazigis Fratan Festeton kun C. E. Allan Kardec ĉe la bieno de Kultura Kooperativo.

• PATRICK PETIOT (C. P. 96920 – 28600 Nova Friburgo-RJ), nia juna kaj tre inteligenta membro, havas novan planon pri instruado de historio. Kiu povos organizi kun li komisionon por antaŭenigi liajn ideojn?

• SOCIETO LORENZ (C. P. 3133 – 20001 R. Janeiro-RJ) konstruas sian sidejon en la urbo Petropolo kaj atendas mondonacojn por finkonstrui ĝin.

• NITEROI E–KLUBO (C. Postal 10 – 24000 Niteroi-RJ) okazigas diversajn bazajn kursojn kaj unu progresigan, kiujn gvidas en diversaj ejoj: Emilio Ferreira, Balbina Ferreira, José Pedro Milagres, Zulmiro B. Neves.

• USEERJ – União das Soc. Espíritas do Est. RJ (R. Inválidos, 182 – 20231 R. Janeiro-RJ) okazigas E-kursojn kaj ĉiel divastigas la lingvon.

• DE FRANCISKO EL ASIZO POR VI, verkita de Humberto Leite Araujo. Moderna verko kun nova koncepto pri la Dia misiisto. Nepre leginda. Mendoj al: SOCIETO F. V. Lorenz – C. Postal 3133 – 20001 R. Janeiro-RJ.

• BUREAU DE NUMISMÁTICA (C. P. 12015 – 22020 R. Janeiro-RJ) de s-ano Alcino B. Beiriz, kie estas aĉeteblaj E-poŝtmarkoj kaj la pola monero je 100 zlotoj kun la figuro de Zamenhof.

## SAN–PAŬLO (SP)

• ESPERANTO NOTÍCIAS (C. Postal 101 – 12280 Caçapava-SP) daŭre aperas pro la sindediĉa laboro de s-ano Silva Velho.

• LEGIÃO DA BOA VONTADE (Av. Rudge, 700 – 01134 S. Paulo-SP) ĉiam aperigas notojn pri E. en sia monata gazeto kaj eldonas flugfoliojn en la I. L.

• CORREIO FRATERNO DO ABC (C. P. 58 – 09700 São Bernardo do Campo-SP) ofte publikigas novaĵojn pri E.

• O SEMEADOR – eldonata de Federação Espírita de Est. S. Paulo (C. P. 8763 – 01000 S. Paulo-SP) ĉiel apogas E-on, kaj regule okazigas kursojn gvidataj de s-ano Arnaldo Viana.

• SANCAETANENSE JORNAL publikigis artikolon "Esperanto en 1988 ĉe la Olimpiadoj" kiun verkis portugale Prof. Arnaldo Viana.

• MOMENTON! – bulteno de BEJO (C. P. 2761 – 01051 S. Paulo-SP) prezentas viglajn artikolojn kaj anoncas novajn Estraranojn: Vic. Zelia C. Silva – P. Alegre; 2a Sekr. João M. Aguilera Jr. – Campinas; 2a Kas. José G. Oliveira – S. Paulo.

• O CAMINHO DA PAZ (La Vojo al Paco), verkita de Valmir Lassance. Leginda fikcio pri viro kriogenike frostigita en 1954, kiu vekiĝis en 2519 kaj troviĝis en tute nova socio parolanta nur E-on. Mendoj al: ABC DO INTERIOR – C. P. 93 – 13360 Capivari-SP.

• LA LAMPIRO, bonega trimonata organo de E–Asocio de S. P. (Rua Faustolo, 124 – 05041 S. Paulo-SP). Abontarifo. Cr$ 7.000 por 1985.

• ALAVANCA (C. P. 1384 – 13100 Campinas-SP) prezentas regule portugallingvan rubrikon pri E, kiun gvidas s-ano David Bianchini.

• O DEMOCRATA, ĵurnalo de São Roque, raportis pri la III Regiona Renkontiĝo kaj pri la kurso okazinta en najbara urbo Mairinque kun apogo de la tiea urbestro.

• E–ASOCIO DE S. CATARINA (Praça 15 de novembro, 215/402 – 88000 Florianópolis-SP) havas jenan Estraron: Prez. Evaldo Pauli; Vic. Belisário Ramos Neto; Plen. Sekr. Walter Boppré; Sekr. Prot. Juari Bitencourt Jr.; Kas. Glauco R. Corrêa; Bibl. Ediná B. Ribas.

• FONTO (C. P. 49 – 89800 Chapecó-SC) estas ĉiam la bela kaj altnivela, vere internacia beletra revuo eldonata en Brazilo. Bonega laboro de s-anoj Gersi Bays kaj Leopoldo Knoedt.

## SUDA RIOGRANDO (RS)

• LETERA REVUO (C. P. 421 – 96100 Pelotas-RS) preparas adresaron por internaciaj interŝanĝoj. Petu informojn.

• DM–AKIRASOCIO organizita de s-ano G. O. Vaske (R. Esperanto s/n.º – 95760 Caí-RS) kaj redomendata de BKE, kiu planas grandskalan kampanjon por apogi ĝin.

## La plej aĝa BRAZILANO

Post longdaŭra esplorado la franca arkeolo Jean Perié malkovris la plej aĝan Brazilanon. Li estas proksimume dekmil jarojn aĝa. Kaj li vivas. Jes, sur rokmuro de kaverno en la ŝtato Mato Groso, proksime la urbo Rondonopolis, tie li paradas inter figuroj de bestoj kaj misteraj signoj. La trovaĵo havas por Sudameriko la saman gravecon kiun posedas la grotoj de Altamira en Hispanio kaj Lascaux en Francio por Eŭropo.

Submetitaj al la testo karbo 14, tiuj bildoj montris la aĝon de dek mil jaroj, kaj tiel ili prezentas la plej aĝan homan artaĵon en Suda Ameriko. Oni ja scias, ke la praul oj de la amerikaj Indianoj venis el Azio tra Beringo antaŭ 30.000 ĝis antaŭ 20.000 jaroj, kaj iom post iom migradis suden. Tamen, tiu ĉi estas la unua pruvo pri ilia spirita kreivo kaj ilia arta gusto. En la kaverno de Morro Só apud Rondonopolis troviĝas ankaŭ la bildo de giganta cervo, birdo kun malfermitaj flugiloj, praĉevalo, figuro de homo kun orelringoj kaj kapornamo kaj strangaj geometriaj figuroj.

Kiel la pentraĵoj de Altamira, tiuj de Rondonopolis, estis faritaj pere de karbo, sango kaj pulvoro de seskvioksido de fero. El tiuj bazaj substancoj la artisto kreis blankan, nigran, ruĝan kaj oranĝkoloran bildon. Analizo montris, ke la miksaĵo de tiuj subtancoj kun graso penetrinte en la murajn porojn ŝtoniĝas, garantiante la senmortecon de la pentraĵo.

La arkeologo Perié nun kolektas la necesajn rimedojn por gvidi plurjaran ekspedicion en Mato Groso por akiri pluan scion pri la vivo kaj moroj de la plej aĝa brazila artisto.

M. Belmonte de Abreu

(El Vel°, n-ro 84/5)



Murpentraĵo en la groto de Morro Só

### DIALOGO

*Ne radikale*
*edzparo dialogas*
*normale*

*Ŝi demandas*
*: Kial fe-de-ra-ci-o?*
*kaj la edzo respondas*
*: Jes, vi pravas. La solvo estas... racio!*

*JORGE DAS NEVES*

# CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

## BALANÇO GERAL

(31.12.84)

### ATIVO

| | | | |
|---|---|---|---|
| I - Circulante | | | |
| BANCOS C/MOVIMENTO.............. | | 13.098 | |
| BANCOS C/POUPANÇA............... | | 1.013.745 | 1.026.843 |
| II - Realizável a Longo Prazo | | | |
| RENDAS A REALIZAR............... | | | 6.200 |
| III - Permanente | | | |
| PARTICIPAÇÕES................... | | 5.000 | |
| IMÓVEIS............... | 5.233.575 | | |
| -Correção monetária.. | 11.266.769 | 16.500.344 | |
| MÓVEIS E UTENSÍLIOS | 1.506.461 | | |
| -Correção monetária.. | 1.111.194 | 2.617.655 | 19.122.999 |
| IV - Compensado | | | |
| CONTRATOS DE SEGURO............. | | | 7.000.000 |
| | | | 27.156.042 |
| ========== | | | ========== |

### PASSIVO

| | | | |
|---|---|---|---|
| I - Patrimônio Líquido | | | |
| FUNDO SOCIAL | | | |
| -Exercícios anteriores.......... | | 5.804.581 | |
| -Exercício de 1984 (incremento).. | | 14.054.148 | 19.858.729 |
| II - Exigível a Curto Prazo | | | |
| CONTAS CORRENTES........................ | | | 297.313 |
| III - Compensado | | | |
| BENS SEGURADOS.......................... | | | 7.000.000 |
| | | | 27.156.042 |
| =========== | | | ========== |

Brasília(DF), 31 de dezembro de 1984

| | |
|---|---|
| Carlos Augusto Siqueira da Cunha | José Carlos Dorini Ramos |
| Presidente | Tesoureiro |

CONSELHO FISCAL